# Ateismo

Bulteno de **Ateista Tutmonda Esperanto Organizo**
http://www.gazetoteko.eu/ateo/ateo09.pdf

Vidu informon en paĝo 13ª




## La celoj de ATEO

1 **Kunligi** esperantistajn ateistojn kaj liberpensulojn.
2 **Disvastigi** Esperanton inter ateistoj.
3 **Defendi** propran egalrajtecon kaj kontraŭi trudadon de religio en neŭtralajn Esperanto-grupojn.
4 **Instigi** ĉe neŭtralaj Esperanto-grupoj, ke oni egale varbu por Esperanto ĉe nereligiaj grupoj se oni varbas ĉe religiaj grupoj.
5 **Akceli** racian pensmanieron en Esperantujo kaj pri Esperanto mem kaj strebi altigi la intelektan kaj kulturan nivelon de Esperantujo.
6 Libere **diskuti** kaj **analizi** ateismajn movadojn, politikojn, kaj filozofiojn kaj ĉiajn rilatajn sociajn problemojn.
7 **Malkateni** la mensojn!

Nº 9-a Novembro 2009

# Vortoj de l' Prezidanto:

## Enkonduko

Unuafoje mi havas la honoron redakti la enkondukon de nia revuo. Okaze de la Universala Kongreso en Bjalistoko (kiun mi bedaŭrinde ne partoprenis), mi estis anoncita prezidanto de ATEO. Mi esperas ke mi estos kapabla plenumi la taskon. Mi kompreneble provos daŭrigi efike la plurjaran agadon de Claude Nourmont, kiun mi sincere dankas nome de la tuta membraro de ATEO.



Samokaze, Anna Löwenstein (Italio) fariĝis sekretario (ŝin ni gratulas). La cetero de la komitato ne ŝanĝiĝis: Dominique Simeone (Francio) kiel vic-prezidanto, Dieter Rooke (Svislando) kiel kasisto kaj Jesús de las Heras (Hispanio) kiel redaktoro.

Mi nomiĝas Christian Rivière, loĝas en Francio, kaj esperantistiĝis en 1991. Mi longe estis senreligiulo, eĉ eksterreligiulo. Nu simple ĉar religio estas por mi tute stranga kaj nenatura ideo, mi ne pripensis pli la aferon. Tio signifas ke religion mi simple ignoris, kaj mi ne mensogos dirante ke mi foje eĉ sukcesis forgesi ke ĝi ekzistas. Mi devas aldoni ke mi loĝas en unu el tiuj relative malmultaj landoj kie religiemo aŭ senkredemo estas io absolute privata, kiu ne rajtas implikiĝi en publikajn aferojn (instruado, politiko, publikaj servoj, afiŝado,...) Krome religiaj agadoj normale ne povas esti financataj per publika mono.

Mi elreviĝis kaj ekkonsciis ke religio povas ne resti eterne sendanĝera antaŭ kelkaj jaroj. Unue, mi konstatis ke konstruado de Eŭropa Super-instanco povas esti grava danĝero por nia laikaj situacio kaj principoj. Due, nia nova franca registaro pli kaj pli ofte atakas kaj limigas tiujn principojn. Ni notu ke ne maloftas landoj kie nunaj registaroj fariĝas komplicoj de religioj, aŭ simple uzas ilin por regi. Trie, evidentiĝis ke religio povas esti serioza kaŭzo aŭ preteksto por provoki militojn. Kvare, okaze de miaj unuaj UK-oj, antaŭ deko da jaroj, mi trovis sintrudemaj kaj foje senskrupulaj la intervenon kaj prozelitismon de kelkaj religiaj grupoj. Mi demandis min ĉu la esperantista movado ne povus inspiriĝi de pli laikaj principoj. Kelkaj furoraĵoj de la esperantlingvaj eldonaĵoj (libroj, ĵurnaloj) povas esti ie-tie ofendaj, eĉ se ne konscie aŭ ne malbonintence. Fine, sub preteksto de literaturo, la temo religio tiom abundas en kelkaj revuoj, ke digestado estas foje do-

loriga. Tial mi nun sentas la bezonon ne resti plu tro neŭtrala, kaj mi opinias ke nepre utilas regula apero de nia revuo por kontraŭi tiujn tendencojn, kaj prezenti nian vidpunkton kadre de la esperantlingva komunumo.

Estas bona kaj pli simpla afero ke ni revenis al tradicia funkciado kun jara kotizo ekde 2010. Tiuj kiuj deziras membriĝi por 2010 povas tion fari de nun (kosto de la kotizo: 15 eŭroj). Kompreneble tiuj kiuj pagis dum la UK ne bezonas repagi.

Mi deziras aldoni ke agado de asocio ne estu limigita je eldonado de revuo, eĉ se de du numeroj jare, kaj je debato kaj budo dum la kongreso. Estus pozitiva evoluo se ATEO povus, kiam okazo prezentiĝas, interveni en neesperantistaj manifestacioj, publikaj kaj politikaj kunvenoj, debatoj k.s. kaj tiel montri ke Esperanto ekzistas. Mi efektive konstatis ke vera ponto-lingvo facile uzebla, mankas al tiuj kiuj volas debati pri tiuj subtilaj temoj kiuj rilatas al la penso, filozofio aŭ vivostilo.

Mi adresas specialan dankon al Pola Radio, kiu menciis nian bultenon en siaj elsendoj.

Pri tio okazinta dum la lasta kongreso mem, raportas Anna Löwenstein en ĉi tiu numero. Dankon al ĉiuj kiuj sendis siajn kontribuojn.

Bonan legadon de la naŭa numero de nia revuo.

*Christian Rivière*

# Fresko-Sonetoj al Christian S.

## *de Heinrich Heine*

## *tradukis Kálmán Kalocsay*


1

La maskon donu! Se mi ĝin surmetas,
mi ŝajnos trampo, por ke ĉi friponaj,
per mask' parada pompe fanfaronaj,
ne kredu, ke kun ili mi societas.
Fivortojn donu, kiujn mi ripetas
kun manieroj krudaj, vulgartonaj!
For de mi spritoj, per sparkad' imponaj,
per kiuj teda grego nun koketas!
Tia dancos mi tra l'granda maskerado.
Kav'liroj, reĝoj, monaĥar' min zonas,
salutas arleken', nur kelkaj konas.
Ĉiuj ĉi batas min per ligna spado.
Jen ŝerco! Ĉar, se l' maskon mi deŝirus,
ĉi penduminda band' ekmute mirus.

2

Mi ridas dandojn, kiuj stulte staras
min algapante kun la ŝafvizaĝo,
mi ridas vulpojn, kiuj kun ruzaĉo
malica min prisnufas kai priflaras,
simiojn doktajn, kiuj sin fanfaras
blovŝvele juĝistar' de sprit' kaj saĝo,
krimulojn, kiuj kaŝe, sen kuraĝo,
venenajn sagojn kontraŭ mi preparas.
Ĉar, se la belajn aĵojn de l' feliĉo
rompis la Sorto kaj, post frakasiĝo,
ĉe l' piedoj ili kuŝas, kaj la koro
en mia korpo iam ŝirita estas,
ŝirita, dispikita— por mi restas
ankoraŭ bela, tranĉa ridsonoro.

*Christian Sethe:*
*ekde la infanaĝo amiko de Heine.*



# ATEO dum la UK en Bjalistoko

Dum la Universala Kongreso en Bjalistoko, ATEO aperis tri fojojn antaŭ la publiko. La unua okazo estis la Movada Foiro. Por kapti la atenton de la preterpasantoj, ni aperigis jenan sloganon sur la tablo: VERŜAJNE NE EKZISTAS DIO — DO, SENSTREĈIĜU KAJ ĜUU VIAN VIVON!

Tiu estis la slogano, kiu aperis en Britujo sur la "ateismaj aŭtobusoj", kiu poste estis transprenita en pluraj urboj tra la mondo.

Pluraj homoj ridis, vidante la sloganon, kaj haltis por diskuti ĝin kun ni. (Aparte interesa kaj diskutiga estas la vorto VERŜAJNE.) Kelkaj estis ofenditaj, kaj multaj rapide preterpasis–ŝajne ili ne volis esti vidataj ĉe la ateisma tablo.


ATEO dum UK

Krom la slogano ni montris la novan numeron (n-ron 8) de nia bulteno, kaj ankaŭ la libreton ĵus tradukitan de Christian Rivière: *La dek du pruvoj pri neekzisto de Dio* de Sébastien Faure.

Mardon la 28an de julio okazis la administra kunveno. Ĉeestis dudeko da homoj, inkluzive de kelkaj ne-ateistoj, kiuj venis pro scivolo. Ni uzis la okazon ĉefe por anonci la nomon de nia nova prezidanto, **Christian Rivière** el Francujo. Multajn dankojn al Claude Nourmont, kiu prezidis la asocion de kiam ĝi refondiĝis antaŭ kelkaj jaroj!

De longa tempo mankas al la asocio **sekretario**, do **mi mem** nun akceptis tiun postenon. Restas **Jesuo de las Heras** kiel redaktoro kaj **Dieter Rooke** kiel kasisto.

Dum la kunveno estis diskuto pri la situacio de la revuo kaj la kotizoj. Ĉar delonge la revuo aperas neregule, oni iam anoncis, ke la 15-eŭra kotizo validos por du numeroj anstataŭ por fiksita periodo. La nova prezidanto deziras reveni al situacio, laŭ kiu la kotizo validas por unu jaro; tio aliflanke signifas, ke la revuo nepre devas aperi regule. Pluraj homoj atentigis, ke 15 eŭroj estas tro alta kotizo, se la revuo aperas nur unu fojon jare; laŭ ili, ĝi devus aperi almenaŭ du fojojn jare. (Cetere, la asocio havas aliajn elspezojn krom eldonado kaj ekspedado

de la revuo; temas pri ĉiujara kotizo al UEA kiel aliĝinta Faka Asocio kaj luado de salonoj dum kongresoj. Tial ĝi efektive bezonas ricevi ĉiujaran kotizon de siaj membroj.)

Krome Maria Merla kaj Detlef Haussner el Germanujo informis pri Esperanta traduko de ateisma infanlibro por infanoj: *Kie ni povas trovi Dion? demandis la eta porkido* de Michael Schmidt-Salomon. Tiu libro temas pri porketo kaj erinaco, kiuj serĉas Dion en diversreligiaj preĝejoj. Ili renkontas episkopon, rabenon kaj muftion, kiuj tamen ne sukcesas konvinki ilin, ke ili vere bezonas Dion. La libro vekis polemikojn, kiam ĝi aperis en la germana. Iuj opinias, ke ĝia senkaŝa kritikado pri religioj estas tro dogma por taŭgi al infanoj[1]. Krome, multaj homoj trovas la ilustraĵojn ofendaj pro la karikaturaj prezentoj de la tri religiaj gvidantoj. Esperantistoj baldaŭ havos eblecon mem decidi, kiam la libro aperos en Esperanto.

La publika kunveno de ATEO okazis ĵaŭdon, la 30an de julio, kun ĉeesto de proksimume 40 kongresanoj. La temo estis: "Altrudo de religio en la publikan vivon". Kontribuantoj estis: Yves Bellefeuille pri la situacio en Kanado, Nikolaj Gudskov kaj Valentin Seguru pri Rusujo, Jehoŝuo Tilleman pri Israelo, Igaraŝi Takeo pri Japanujo, kaj Michael Sedgley pri Usono. Pluraj el iliaj kontribuoj pri tiu temo aperas en ĉi tiu numero de la revuo. Legantoj estas invitataj daŭrigi la diskuton per pliaj leteroj kaj artikoloj.

*Anna Löwenstein, Italujo*




[1]Noto de redaktoro: mi tie konstatigis, ke tamen, malpli dogma ol tiuj religioj, kiuj minacas per infero poreterne al infanoj, se ili ne kredas tion, kion ili postulas, kio estas pli grava ol minaco de morto.

# Vojaĝo en la menson de la Kosma Kreinto

Ekde pluraj jardekoj astrofizikistoj atribuas la ekeston de nia universo al la Pra-Eksplodo (sprite akronimata "PEKO" de esperantista astrofizikisto Amri Wandel[1] ). Pruvoj ke ja okazis tiu fenomeno, ĉiam pli multiĝas ekde la unua granda konfirmo de usonaj scientistoj Penzias kaj Wilson en 1965 – la usonaj satelitoj COBE en 1992 kaj WMAP en 2003 plu konfirmis ĝin. Nu, por multaj di-kredantoj, la PEKO mem estas pruvo de io alia, io eĉ pli grandioza: la ekzisto de Kosma Kreinto. Por ili, la Geneza rakonto estas respeguliĝo de la PEKO: "En la komenco Dio kreis la ĉielon…" Tuja, ege grava rezulto de la PEKO estis la fiksiĝo de aro da konstantoj, t.e. fundamentaj proporcioj, laŭ kiuj nia universo estas konstruita. Eta ŝanĝo en la valoro de iu ajn el tiuj konstantoj malebligus la ekziston de tia universo, kian ni konas – kaj ĉian vivon en ĝi. Ekzemple, la universo povus esti kolapsinta antaŭ formiĝado de steloj. Tio por diversaj scienc-atentaj teologoj kaj aliaj kleraj di-kredantoj estas klara plua pruvo: laŭ ili, la Kosma Kreinto mem precize agordigis la konstantojn.

Sed tiaj asertoj de di-kredantoj estigas plurajn fundamentajn demandojn. Kiel precize la Kosma Kreinto startigis la kread-procezon kaj fiksis la konstantojn, kiuj formis la universon? Se oni asertas, ke X estas la kaŭzo de Y, oni tiam devas montri, aŭ almenaŭ hipotezi *kiel* X kaŭzis Y, alie ni rajtas dubi, ĉu fakte X estas la kaŭzo, kaj plue ĉu X eĉ ekzistas. Kiamaniere la K.K. kreis la komencan mikroembrian universon, kiu ekŝvelis tiom subite kaj vaste? Di-kredantoj provas "klarigi" tiajn aferojn, asertante simple ke la K.K. efektivigis ĉiujn el la diversaj paŝoj priskribitaj per la moderna teorio de kosma ŝvelo. Ekzemple, ili povus diri, ke li fiksis la konstantojn post apartigi la kvar fundamentajn fortojn (gravito, ktp). Sed, atribuante tiujn eventojn al li, ili simple rajdas sur la dorson de tio, kion astrofiziko lernis kaj teoriis. Kaj ankoraŭ, ili ne klarigas *kiel* la K.K. fakte faris ĉion ĉi – ĉar ili tute ne havas iun ajn ideon pri tio. Ili verdire simple antaŭsupozas lian ekziston.

Leviĝas pli ĝenerala demando: Se la Kosma Kreinto ekzistas ekster la regno de la fizika mondo, kiel transcenda estaĵo, kiamaniere li kreis la fizikan mondon? Plue, kiamaniere iu ajn estaĵo, supernatura aŭ ne, povas krei energion *ex nihilo* (t.e. el nenio)? Ĉu la K.K. povis simple per sia *volo* ekzistigi ĝin? Tiu demando povas esti starigita pri iu ajn el liaj supozataj agoj en la fizika mondo. Se la respondo estas jes, tio tamen lasas nesolvita la demandon, kiel li povas efektivigi tiajn atingojn sole per volforto?

Sed, bedaŭrinde por la di-kredantoj, kiuj ne povas imagi universon sen Kosma Kreinto kaj ĉiopova patreca reganto, la problemoj ne finiĝas ĉe la ĉi-supraj demandoj. Estas tempo rigardi en la menson de la K.K. kaj konsideri kion kuntrenas konceptado de universo. Kompreneble mi faras la supozon ke la K.K., estante la plej supera inteligento kiu regas la universon, havas menson aŭ eble *estas* menso – kaj menso havanta vastegan kapaciton. Por koncepti kaj dezajni

universon, oni devas pensi, kaj por pensi oni bezonas menson aŭ bezonas *esti* menso. Kutime oni supozas ke la K.K., kiel transcenda, supernatura estaĵo, ekzistas ekster spaco kaj tempo, spactempo estante trajto de nia fizika mondo kreita de li per la PEKO. Sed… kiel la K.K. povas pensi se li estas ekstertempa? Sen tempo, povas ekzisti nek komenco nek fino de pensad- kaj kread-procezo, sekve neniu penso aŭ kreado povas esti komencita aŭ finita. Krome, kiel li povis efektivigi lian kosman kreadon? Li devus esti la kaŭzo kaj la universo la efiko – sed la kaŭzefiko-sinsekvo necesigas tempon. Kaj se li estas jam parto de spactempo, li ne povis krei ĝin!

Troviĝas plua problemo rilate la menson de la Kosma Kreinto. Laŭ la anglalingva Katolika Enciklopedio, la Kreinto estas ĉiel senlima. Sufiĉe strange, tiu senlimeco ne inkluzivas spacan kaj tempan dimensiojn, ĉar li ekzistas ekster spac-tempo. Sed ja estas vojo laŭ kiu li povas enŝteliĝi: li estas konsiderata ankaŭ "ĉieesta", kaj agas libere ene de spaco kaj tempo. La senlimeco de la K.K., speciale lia ĉioscio kaj lia ĉieesto, necesigas senliman menson. Sed ĉu senfina menso povas pensi? Ĉu senfina menso povas funkcii kiel *unu integra* ento aŭ organismo kun aŭ centra nabo aŭ malcentrigita interretaĵo? Mi dubas, aparte de demando, ĉu menso povas ekzisti sen ia fizika cerbo. Senlima "menso" povus enhavi senliman nombron da aŭtonomaj limhavaj entoj, sed tiukaze ni ne plu parolus pri unu integra ento. La enciklopedio enlistigas la unuecon de la Kosma Kreinto kiel lian duan plej gravan trajton post senlimeco. Por ĉiuj monoteismaj religioj, ekzistas nur *unu* tia estaĵo.

Kaj la problemo de senlima menso estas parto de eĉ pli granda problemo: ĉu senlima estaĵo povas entute ekzisti? Kiel usona filozofo GeorgeH.Smith observas, "Esti signifas esti *io*…kaj esti io signifas esti io specifa".[2] Sed specifi ecojn de iu estaĵo signifas ke oni limigas tiun estaĵon, tial oni atribuas al la K.K. "senlimajn ecojn": ĉieesto, ĉioscio, ĉiopovo, ktp. Fakte, religiaj aŭtoritatuloj kaj teologoj priskribas la K.K. nekredeble detale. Tamen, oni scivolas kiel ili scias *ion ajn* pri supozata estaĵo kies ecoj, inkluzive la eco de ekzisto, ne povas esti malkovrita per iuj ajn rimedoj konataj de la homaro. Ne, ili ne povas malkovri science, do ili simple postulatas kaj falsas. Kaj eventuale, ili uzas la eskapilon postulati nekoneblon kaj nepenetreblon. Memkontraŭdiroj abundas en la priskriboj de la Kosma Kreinto kaj ja estas la ĉefa tasko de teologoj fari sian plejon solvi ilin per komplikaĉaj intelektaj manovroj. Nura ekrigardo tra la artikolo en la Katolika Enciklopedio pri "La naturo kaj ecoj de Dio" transdonas ian guston de tiuj ĉi teologiaj akrobataĵoj.[3]

Fine, mi venas al ankoraŭ unu fundamenta demando, eble la plej grava demando rilate la temon de tiu ĉi artikolo. Por preciz-agordigi la univers- kaj vivebligajn konstantojn, kaj ĝenerale, por koncepti kaj krei nian universon kaj inteligentan vivon sur nia planedo, grandega kvanto da scio estis bezonata. Nemezureble pli granda kvanto ol tio posedata entute de ĉiuj fizikistoj, matematikistoj, kemiistoj, genetikistoj kaj biologoj en la mondo. *De kie akiris la*

*Kosma Kreinto tiun ĉi scion?* Ĉu ekzistas universitato por kosmaj kreantoj? La centra argumento de Richard Dawkins kontraŭ la ekzisto de Kosma Kreinto en sia nun fama libro “La Iluzio pri Dio” estas ke io tiom kompleksa kiel la universo, povus esti imagita nur fare de io eĉ pli kompleksa, sed kompleksеco povas ekesti nur per evolua procezo. Jes, la K.K. devus esti nekredeble kompleksa, sed mi argumentus, ke tiu ĉi kompleksеco konsistas ĉefe el la vastega scio, kiun li devus posedi. Jen ni troviĝas en senelira punkto.

Ĉu la K.K. ĉiam posedis tiun ĉi scion? Tio certe ŝajnas esti korolario de ĉioscio, unu el la ĉefaj ecoj de la Kosma Kreinto. (Ni vere devas admiri la Katolikan Eklezion kaj multajn aliajn religiajn aŭtoritatulojn tial ke ili scias tiom multe pri li, inkluzive la fakton ke li scias ĉion!) Sed, kion signifas “ĉiam” rilate ekstertempan estaĵon? Kaj mi scivolas: kion faris la K.K. *antaŭ* ol li komencis plani la universon? Tio supozigas, kompreneble ke “antaŭ” havas iun signifon en situacio de ekstertempeco. Nu, se la K.K. estis ĉiam “ĉioscia”, ĉu li fakte devis okupiĝi pri procezo de pensado kaj dezajno por krei la universon kaj ĉiujn ĝiajn elementojn ĝis la plej etaj partikloj, kiel kvarkoj kaj leptonoj? Ĉu eble la kompleta koncepto, inkluzive la precizajn detalojn de la partikloj de fiziko, jam estis parto de lia ĉioscio? Se jes, ĉu ni eĉ rajtas diri, ke li konceptis la universon? Eble kreado de la universo estis simple esenca al li, same kiel araneo instinkte teksas reton.

Senkonsidere ĉu la Kosma Kreinto estas transcenda kosma araneo aŭ la plene memkonscia transcenda inteligenta estaĵo de Kristanismo kaj aliaj religioj, la problemo pri kiel li akiris sian scion – aŭ eble la jam pretan genetikan programitecon, kiun li aranee efektivigis – estas *nesolvebla*, kiel same la demando pri lia deveno mem, krom fali en senfinan regresadon de kaŭzo-efiko. Por eviti tian regreson, oni devas argumenti, ke la kompleksega scio bezonata por krei universon estis kaj estas esenca al la K.K. Tio ĉi, tamen, estas intelekta nigra truo. Estas multe pli probable ke kompleksеco, ordo, kaj evoluo estas esencaj al la universo mem. Dum “dezajniteco” povas esti esenca al la natura regno, la *scio* bezonata por trudi aŭ realigi tiun ĉi dezajnitecon *el ekstere* ne povas esti esenca. Mi kredas, ke tio estas neebla. Kaj postulati ĉiopovon ne estas solvo, ĉar eĉ ĉiopova K.K. ne povas *ex nihilo* krei sian propran esencan, eternan, kaj ĉioampleksan scion. Denove, tio estas neebla.

**Nyegosh Dube (Pollando)**

[1] David Galadí-Enríquez kaj Amri Wandel, *La Kosmo kaj ni*, Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno, 2005, p. 186

[2] George H. Smith, *Atheism: The Case Against God*, Prometheus Books, Amherst, NY, 1979, p. 41.

[3] “The Nature and Attributes of God”, *Catholic Encyclopedia*, reta versio, http://www.catholic.org/encyclopedia/view.php?id=5220

# Eklezio kontraŭ demokratio en Pollando

Apartigo de ŝtato disde religio estas konsiderata baza elemento de moderna demokratio–sed bedaŭrinde ne en Pollando. Por la ankoraŭ potenca Katolika Eklezio, ne sufiĉas efektivigi sian influon per diservoj kaj predikoj en preĝejoj, nek per ĉe-preĝeja instruado de infanoj, nek per Katolika radio-televido kaj gazetaro, nek per Katolikaj lernejoj. Ne sufiĉas, ke 90% de la pola loĝantaro apartenas al la Katolika Eklezio, nek ke ĉirkaŭ duono de la loĝantaro ĉiusemajne ĉeestas diservojn katolikajn, t.e. la plej alta proporcio en Eŭropo krom Malto. Ĉio ĉi ne sufiĉas.

Ne, la Katolika Eklezio klopodas konservi kaj plivastigi sian influon ankaŭ per alia rimedo: la pola ŝtato. Tiu estas ŝtato kiu laŭ sia konstitucio estas neŭtrala pri religio kaj garantias religian egalecon kaj liberecon, inkluzive la rajton ne aparteni al iu ajn religio kaj ne publikigi onian religian kredon aŭ ne-kredon. Sed, ne gravas. La pola ŝtato fakte cedas superan pozicion al unu religio, unu eklezio, kaj donas al ĝi privilegiojn kaj rimedojn nehaveblajn de aliaj eklezioj aŭ asocioj de nekredantoj. Tiu laste nomita grupo da civitanoj, la senreligiuloj, nombras inter 6% kaj 8% de la loĝantaro, do proksimume inter du kaj tri milionoj da homoj – ne bagatela kvanto. Sed efektive tiuj du-tri milionoj estas duarangaj civitanoj en sia propra lando.

## *Konkordato kontraŭ-konstitucia*

La formala fundamento de tiu pozicio de supereco estas la Konkordato inter Vatikano kaj la Pola Respubliko, subskribita en 1993 kaj aprobita de Parlamento en 1998. Kaj la maniero aprobi la Konkordaton kaj la enhavo de tiu dokumento kontraŭas la Konstitucion (alprenitan en 1997). Laŭ ĉi-lasta, iuj ajn internaciaj traktatoj kiuj devigas Pollandon cedi iun parton de sia suvereneco devas esti aprobita de ambaŭ ĉambroj de Parlamento per du-triona majoritato. Tamen, la Konkordato, kiu ja estas internacia traktato postulanta cedon iugradan de suvereneco, estis aprobita de simpla majoritato. Enhave, troviĝas pluraj breĉoj de la Konstitucio, ekzemple la devigo instrui religion (fakte *Katolikan* religion) en publikaj lernejoj, kion mi traktos ĉi-sekve, kaj la devigo al la ŝtato financi edukadon de katolikaj teologoj. Eble plej rimarkinde estas ke la Konkordato *ne* devigas la Eklezion obei la Konstitucion kaj malpermesas al la Parlamento retiri iujn gravajn leĝajn eklezia jn privilegiojn, precipe financajn, sen la konsento de la Eklezio mem.

Sed la nura fakto, ke ekzistas Konkordato, speciala traktato kun unu eklezio, estas diskriminacia kaj kontraŭkonstitucia; laŭ la Konstitucio, eklezioj kaj aliaj religiaj asocioj estas egal-rajtaj kaj la ŝtato devas esti senpartia en aferoj religiaj kaj mondrigardaj. Tamen menciindas, ke la Konkordato mem influis la verkadon de la Konstitucio, kiu sekve *ne* postulas apartigon de ŝtato disde religio kaj entenas diversajn privilegiojn por la Eklezio – do iasence partoj de la Konstitucio kontraŭstaras unu la alian. Krome, troviĝas multaj privilegioj en la pola leĝaro, plimulto el tiuj ekzistis jam antaŭ la subskribo de la Konkordato.

Katolikismo altrudita en publikaj lernejoj

Kvankam la Konstitucio garantias egalrajtecon de religioj kaj liberecon de kredo, kaj malpermesas al la ŝtato devigi iun publikigi sian kredaron aŭ devigi partoprenon en religiaj praktikoj, ĉiu lernejo (ekde elementa nivelo) devas okazigi instruadon de religio, de Katolika religio – se almenaŭ sep lernantoj aliĝas al la kurso (kun konsento aŭ pro volo de liaj gepatroj), kvanto ĉiam facile atingebla. Tiu instruado devas esti realigita fare de homoj aprobitaj de la Eklezio, efektive katolikaj pastroj, kaj la enhavo de la instruado ankaŭ bezonas la aprobon de la Eklezio. Kiu pagas la instruistojn-pastrojn por instrui kaj ensemi katolikan doktrinon? Kompreneble la ŝtato! Partopreno de lernejanoj en religio-kursoj ne estas deviga, tamen en realeco ĉirkaŭ 90% da lernejanoj partoprenas, ĉefe pro la socia premo. Nepartopreno ofte rezultigas izoladon kaj elgrupigon, ne nur de la koncerna lernejano sed ankaŭ de ties familio. Sed krom tia socia premo, ankaŭ ekzistas instigilo: sekve de decido de la antaŭa, tre katolikema registaro, la notoj ricevitaj en religio-kursoj estas enkalkulitaj en la ĝenerala not-averaĝo – kaj plej ofte la instruistoj-pastroj disdonas la plej altajn notojn ("5" aŭ "6"). Nu, ja tre bona instigilo por partopreni! Menciindas ankaŭ ke la religio-kursoj okazas ne la unuaj aŭ lastaj en la lerneja tago, kio signifas, ke lernejanoj ne aliĝintaj devas sidi en koridoro aŭ alie sin okupi dum la klas-horo.

Ekzistas ebleco por lernantoj en iu lernejo elekti etikon anstataŭ religion, denove se almenaŭ sep lernantoj sin anoncas. Tamen, eĉ se iu kuraĝas elekti etikon, mankas miloj da instruistoj de etiko, tiel ke fakte dum religio estas instruata en pli ol 27000 lernejoj, etiko estas proponata nur en ĉirkaŭ 500 lernejoj! (Kompreneble estas demando: Kia etiko? Ja ekzistas diverseco de etikaj sistemoj.) Sed, malgraŭ tio, ekde la lernej-jaro komenciĝanta en aŭtuno de 2009, estos devige elekti aŭ religion aŭ etikon. Kion tio signifas? Fakte, pligrandiĝon de la potenco de la Eklezio kiu, pro manko de etiko-instruistoj, mem provizos ilin – pastroj instruos ankaŭ etikon kie ne troviĝas etiko-instruistoj! Bele, ĉu ne? Estas memkompreneble, ke se iu publika lernejo organizas religio-klasojn, tiuj klasoj estu *pri* religio kaj religioj, kaj estu religie *neŭtralaj*. Ideale, en tiaj klasoj oni ankaŭ pridiskutu la ekziston-neekziston de Dio kaj la (kutime nepruvitajn) asertojn de diversaj religioj – oni igu lernejanojn pensi kaj analizi sendepende kaj kritike. Sed ne, en Pollando temas ekskluzive pri senkritika, senanaliza endoktrinigo de lernantoj favore al unu specifa religio. Tio ja estas tute kontraŭdemokratia kaj malakceptinda.

Katolikismo altrudita en virinaj korpoj

Jam en 1993, sub la premo de la Katolika Eklezio, Pollando alprenis unu el la plej striktaj kontraŭ-abortaj leĝoj en Eŭropo. Aborto estas malpermesata krom se la vivo de la virino estas endanĝerigita de la nasko, se la gravediĝo rezultis el krimo, aŭ se la feto estas misformita. Nesurprize, tiu ĉi malpermeso instigis la fenomenon de "aborto-turismo": miloj da polinoj ĉiujare veturas al najbaraj landoj, ĉefe preter la orienta landlimo, por havi abortojn. Krome okazas almenaŭ

kelkcent kontraŭleĝaj abortoj en Pollando mem.

Nu, lastatempe, la Eklezio decidis, ke ne sufiĉas kontraŭstari aborton kaj lanĉis kampanjon kontraŭ envitra fekundigo, subtenata kiel ĉiam de diversaj dekstremaj partioj. Laŭ la Eklezio, envitra fekundigo estas formo de aborto, ĉar ofte embrioj estas forĵetitaj aŭ frostigitaj dum la procezo. Do, pro tio ĝi deziras forigi de nefekundaj paroj la eblecon havi proprajn infanojn. Aktuale, ne ekzistas leĝo en Pollando reguliganta envitran fekundigon. Tial, kelkaj leĝ-proponoj estis prezentitaj en la Parlamento, el kiuj nur unu estas liberala. Unu propono eĉ punus kuracistojn kiuj envitre fekundigas, per trijara enkarcerigo! Verŝajne tiu ekstrema propono ne estos aprobita, sed la pli konservativa el la du proponoj de deputitoj de la ĉefa reganta partio – ambaŭ diversmaniere limigus envitran fekundigon sen tute malpermesi ĝin. Laŭ opini-enketo farita en 2008, 60% da poloj subtenas la rajton al envitra fekundigo (kvankam en 2003 eĉ pli subtenis, 76%, do videble la Eklezia kampanjo havis efikon).

### *Katolikismo altrudita en amasinformiloj*

La penado de la Eklezio superregadi socion etendiĝas, apenaŭ surprize, al la amas-informilaro. Estis jam ĝene, ke ĝis tiu ĉi jaro (2009), la ŝtataj amas-informiloj, t.e. publika radio kaj publika televido, estis leĝe devigataj "respekti" kristanajn valorojn. Tio, kiel ni povis ekspekti, ne kontentigis la Eklezion, tial de ĝiaj samideanoj en la Parlamento, estis prezentita leĝ-propono kiu devigus la publikan amas-informilaron *subteni* kristanajn valorojn. Bedaŭrinde, tiu klara atenco kontraŭ la konstituciaj garantioj pri gazetara libereco kaj ŝtata neŭtraleco pri religio, estis aprobita de la Parlamento per 67-procenta majoritato! Nerespondita restas la demando, kio ĝuste estas "kristanaj valoroj" kaj kiel ili diferencas de ne-kristanaj valoroj. Tamen oni povas supozi, ke temas pli precize pri katolika ideologio kaj mondrigardo.

Jam aparte de tiu ĉi altrudo, la Katolika Eklezio disponas pri multe da influo per amasinformiloj. Ĉiuj paroloj de la Papo kaj episkopoj kaj multaj aliaj ekleziuloj estas fidele raportataj fare de la ŝtataj kaj privataj televid-kanaloj, sen iu ajn klopodo prezenti alternativajn, kontraŭ-ekleziajn vidpunktojn. Sed aldone, ekzistas tutlanda katolika amasinformila imperio sub la gvidado de fifama pastro Tadeusz Rydzyk – la imperion konsistigas radio-reto (Radio Maryja), televid-kanalo, ĉiutaga gazeto, altlernejo de ĵurnalismo, kaj du fondaĵoj. La Rydzyka imperio ne apartenas al la Eklezio kaj ofte esprimas pli ekstremajn opiniojn (kontraŭ judoj, samseksemuloj, aliaj landoj, kaj la Eŭropa Unio) ol la ĉef-tendenco de la Eklezio, tamen ĝi estas potenca disvastigilo de katolika propagando. Pli ol unu miliono da homoj (plejparte maljunaj) aŭskultas Radion Maryja, grupo kiu ludis gravan rolon en la venko de la antaŭa reakcia superkatolika registaro kaj de la nuna samideologia prezidento.

### **Religi-protekta leĝo kontraŭ-demokratia**

La 15-an de aŭgusto ĉi-jare, la fama popular-muzika kantistino Madonna koncertis en Varsovio. Sed antaŭe, grupo de naciismaj, konservativaj katolikoj

formis grupon kun la pompe minaca nomo “Komitato por la Defendo de la Kredo kaj Naciaj Tradicioj”, estis formita por la celo malebligi la koncerton de Madonna. Kial? Ĉar ŝi elektis fari ĝin je nacia religia festotago, la Ĉieliro de Maria! Eĉ Lech Walesa, la mondfama batalanto por libereco kaj rajtoj, subtenis la Komitaton.

La grupo bazis sian kontraŭ-Madonnan kampanjon je Artikolo 196 de la Krimleĝaro, kiu malpermesas ofendi religiajn sentojn de aliaj homoj per publika insultado de objekto de religia adorado, aŭ de loko destinita por publikaj ceremonioj religiaj. En praktiko, la leĝo estas foje tre larĝe interpretita por procesi kontraŭ homoj kiuj iel ajn agis kontraŭ la Eklezio aŭ ekleziuloj, aŭ simple neintence iel ajn ofendis religiajn sentojn. Feliĉe, la kampanjo kontraŭ Madonna ne sukcesis. Sed la leĝo jam estis uzata kontraŭ, ekzemple, artaj ekspozicioj. Ĝi estas konstanta minaco al la libereco de esprimado –fundamenta por demokratio– garantiata de la Konstitucio.

Krucoj altruditaj kaj aliaj finaj rimarkigoj

Pollando estas hodiaŭ lando de krucoj: en la ĉefa halo de la Parlamento troviĝas kruco sur la muro antaŭ la deputitaro; en ŝtataj oficejoj kaj institucioj oni foje vidas krucon ĉe muro, ekz. en mia loka poŝt-oficejo; multaj monumentoj en Pollando konsistas el unu aŭ pli da krucoj. Kompreneble tio ĉi kaj la supre menciitaj altrudoj de katolikismo-kristanismo en Pollando respegulas la fortan katolikecon de la plimulto da poloj, kvankam en la lastaj jardekoj la nombro da efektive praktikantaj kaj plenkredantaj katolikoj falas. Tial, la nombro 90% estas iom trompa. Tamen Pollando restas ege katolika lando, kie katolikismo estas integra parto de la nacia identeco, kio certe kuraĝigas la Eklezion ekzerci sian influon kaj potencon malgraŭ la sekvoj pri demokratio kaj libereco.

*Nyegosh Dube (Pollando)*

# Omaĝi al Francisko Ferrer

**Sabaton la 28-an de novembro 2009 je la 2-a posttagmeze.**

**Ĉambron de la sekulara patroneco - 72, avenuo Félix Faure - 75015 Parizo (Francio).**

**Metro-stacio: Boucicaut/Lourmel Buso 62 a 42 Tramo T3 Balard.**

Internacia Kolokvo en Parizo.

**Sub la patroneco de la Internacia Humanista kaj Sekulara Unuiĝo (IHEU).**

**Sub la prezidanteco de Marc Blondel, prezidanto de la Franca Liber-Penso.**

**Tri ĉefaj referaĵoj:**

*Francisko Ferrer, pioniro de la racionalisma kaj emancipema lernejo* de **Pol Delfosse de la Centro de Sekulara Agado de Bruselo (Belgio).**

*Francisko Ferrer kaj la populara movado en Hispanio* de reprezentanto de la **Eŭropa Sekularo de Hispanio**.

*Francisko Ferrer, simbolo de la lukto kontraŭ-klerikala en Eŭropo,* de **Jean-Michel Ducomte, prezidanto de la Franca Ligo de Instruado.**

Multaj francaj asocioj kaj de aliaj landoj partoprenos tiun kolokvon.

Dum tiu kolokvo, mi prelegos pri la rilatoj inter Charles A. Laisant, Elisée Reclus kaj Francisko Ferrer. Ĉiuj estis anarĥiistoj kaj liberpensuloj. Ili jam defendis esperanton de la komenco de la 20-a jarcento antaŭ la Unua Kongreso en Bulonjo-ĉe-Maro en 1905.

*Dominique Simeone*

# Ateismo per racia argumentado

Sébastien Faure, laŭ la interesa biografieto fine de ĉi tiu libreto, estis franca anar?iisto, liberpensulo, verkisto, kaj fondinto de libereca lernejo en la jaroj antaŭ la Unua Mondmilito.

En ĉi tiu mallonga kaj facile legebla libreto, unue eldonita en 1914, li celas pruvi per raciaj argumentoj, ke Dio ne ekzistas. Li prenas la koncepton "Dio", kiel ĝi estas prezentita laŭ la kristana religio, kaj montras la malkongruojn en la prezento, la internajn kontraŭdirojn en la argumentoj por la ekzisto de Dio.

Konforme kun la racia aliro, la libro mem estas aranĝita laŭ tre klara skemo, kiu estas resumita en la enkonduko. Estas do facile por la leganto kompreni la sinsekvon de la argumentoj. Ĉi tiu libro devus plaĉi precipe al legantoj, kiuj ĝuas sisteman kaj logikan pensomanieron.

La libro estas malmultekosta: nur 4 eŭroj plus sendokosto. Mendante ses ekzemplerojn oni ricevas rabaton kaj ne pagas la sendokostojn. Do, indas al membroj de ATEO mendi ses por vendado ĉe lokaj grupoj, naciaj kongresoj kaj simile. Tiel oni helpos diskonigi la argumentojn favore al ateismo.

*La dek du pruvoj pri neekzisto de Dio* de Sébastien Faure, esperantigis C. Rivière. Eldonoj Liberecanaj: Nantes, 2008. (40 paĝoj)

Mendebla ĉe: Christian Rivière

7 chemin de la Viollerie
44300 Nantes
Francujo.

Retadreso: christian.riviere@laposte.fr

*Recenzis Anna Löwenstein*




«La dek du pruvoj pri neekzisto de Dio» de Sébastien Faure (1858-1942) estis unuafoje eldonita en 1914, de la liberecana lernejo «La Abelujo».

Sébastien Faure kelkcent-foje prelegis antaŭ ĝis tri mil personoj, eĉ ĝis la kvara matene. Ĉeestis pastroj kaj pastoroj kiuj libere debatis. Ateistoj havis neniun kialon timi porreligian esprimon. La rezulto estis ĉiam nete favora al iliaj tezoj.

Sojle de nia dudek-unua jarcento, dum pluvas atakoj kontraŭ la laikaj principoj, dum floras kreismaj doktrinoj kaj integrismaj dogmoj, daŭre legindas ĉi teksto de Sébastien Faure.

Tradukis kaj eldonis Christian Rivière.

Kvardekpaĝa / A5-formata / aĉetebla ĉe la libroservo de UEA aŭ ĉe la eldonisto mem per simpla retmesaĝo.

# Ateismo en Japanujo

## 1. Enkonduko

Japanujo estas rigardata plej nereligia lando en la mondo. Japanoj ne kiel kristanoj frekventas preĝejon regule, ekzemple ĉiun dimanĉon. Ili tamen ordinare dungas budhisman bonzon aŭ bonzojn por okazigi religiajn ritojn kiam la patro mortas. Ĝi estas preskaŭ la sola okazo kiam ili konscias pri religio. Aliaj tiaj okazoj, kvankam ne tiel gravaj kiel tiu de la funebro, estas tiu por vizito al ŝintoisma templo kiam la gepatroj riverencas la dion aŭ diojn por sia infano. Tiu kutimo malprosperas de jaro al jaro. Tiamaniere du religioj kunvivas pace en la japana koro. Oni dirus ke la situacio estas simila kiel en Eŭropo, precipe en Francujo, kie probable estas proporcio de ateistoj la plej granda en Eŭropo. La diferenco konsistas en tio ke ĉe protestantoj la partoprenantoj de la rito komprenas la signifon de tio kion diras la sacerdoto en la preĝejo. En Japanio, oni ne scias kion signifas vortoj de bonzoj, ĉar ili ĉantas budhismajn sutrojn en ĉinlingva teksto, kiu estas traduko de sanskrita originalo. Okcidentanoj dirus ke la situacio estas sama kiel en Japanujo en tio ke la katolikoj ne komprenas la latinan tekston legatan de la pastro, dum en la okazo de protestantoj kiuj legas la tradukon de la Biblio fare de Lutero, aŭ se temas pri intelektuloj, ili komprenas latinajn tekstojn legatajn, dum japanoj ne komprenas ĉinan tekston recitatan aŭ legatan, ĉar la ĉina lingvo estas komprenebla nur legate en literoj pro la tro granda diferenco inter la strukturo de la du lingvoj. Mi mem ne komprenas la sutron legatan de bonzoj.

La japanoj observas budhismajn ritojn sed estas preskaŭ indiferentaj pri la religia enhavo de la ceremonio, ili rigardas ĝin speco de socia institucio, ne pli. Iuj pensas ke la transa mondo ekzistas, pli granda amaso ne kredas tion, sed ili ne estas merkato de la ateismo. La konscio de la japanoj pri la vivo kaj la morto estas fakte nula.

## 2. Budhismo

La origino de la ŝtato en Japanio situas en la 4a kaj 5a jarcentoj. La naturo de la ŝtato ne estas tiu de la azia modo de produktado en la senco de la Kritiko de la politika ekonomio de Marx (1859) sed tiu de la antikva, aŭ grekromia, t.e. bazita sur la sklaveco. La plej prospera epoko estis en la 8a jarcento kun la ĉefurbo en Nara, en la nuna regiono Kioto-Osaka. La ŝtata religio estis la budhismo, importita de Ĉinujo. Ĉirkaŭ la jaro 800, kiam en Eŭropo Karolo la Granda estis kronita de la papo Leono la tria, la Granda, kiel imperiestro de la romia imperio, okazis en Japanujo reorganizo de la produktada kaj politika mondo. La ĉefurbo estis translokita norden de Nara al Kioto. La jarcentoj 9a ĝis 12a estas nomataj la erao Kioto, en kiu la ĉefo de la ŝtato estis imperiestro, sed la politika povo estis en la mano de la familio Huziwara, kiu tenis la pozicion de la kanceliero aŭ majordomo. La politika povo estis en la mano de aristokratoj kiuj posedis la militistan povon perfekte en siaj manoj super la nova kavaliera klaso de samurajoj.

Rilatoj inter la laikaj kaj la religiaj aristokratio estis simbiozo; episkopoj venis el la aristokratoj kaj el la imperiestraj familianoj, sed episkopoj ne tenis politikan povon. La registaro estis laika: granda diferenco kun Eŭropo. Alia diferenco estas manko de papo: episkopoj havas neniun ĉefon tian kia la papo.

Dume, malproksime oriente de la ĉefurbo Kioto, en la nuna distrikto Tokio, lokaj land- kaj sklav-posedantoj armis sin kaj konkeris

la registaron kaj starigis sian propran ĉefurbon en Kamakura, iom sude de la nuna Tokio. Tiu registaro estis nomata ŝogunejo (vidu PIV) de Kamakura, dum la malnova registaro en Kioto posedis nur spiritan aŭtoritaton. En Eŭropo, la religia aŭtoritato estis unu, la Papo, sed en Japanujo troviĝis nur episkopoj, ne Papo. Religiuloj ne ekhavis politikan povon, sed politikistoj fariĝis religiuloj post emeritiĝo. Iuj tiaj episkopoj famiĝis kiel la emerita imperiestro Sirakawa la dua, kiu pensigas pri imperiestroj kaj generaloj en la lastaj tagoj de la romia imperio kun ekz. Stilicho: ruza, senhonta, kaj ambicia. Oni tamen ne forgesu ke temas pri la antikveco, ne pri la proksim-moderna periodo de despotismo kun Richelieu kaj Mazarin aŭ de Karolo la unua kaj Cecil kaj Laude en Anglujo.

## *3. "Disrompo de Budhoj kaj forĵeto de Sjaka" meze de la 19a jarcento*

Okaze de la kvazaŭ-revolucio de 1868, kiu enkondukis la internacian, modernan civilizacion en Japanujon, ekis la movado por abolo de la forto de la budhismo.

Kun la adopto de la budhismo en la antikveco naskiĝis en Japanio teorio de metamorfozo de la budhoj en japanajn diojn, nome, la japanaj dioj estis interpretataj estiel tiuj sanskritaj renaskitaj sur la tero de Japanio. Tio estis tipe japaneca sinkretismo. Oni ekpensus pri la kunrespondo de la romiaj kaj grekaj dioj, kiel Jupitero kaj Zeŭso, Venuso kaj Afrodita. Dume, troviĝis inter revoluciuloj de 1868 ŝintoistoj kiuj postulis disrompon de ligo de japanaj dioj kaj budhismaj budhoj. Malgraŭ tio, japanaj dioj kaj budhismaj sanktuloj kunvivis en la koro de kamparanoj.

Rezulte de tiu kontraŭ-budhisma movado retroiris la imperia familio de Japanio de sia longtradicia budhismo al la antaŭ-budhisma ŝintoismo. La Budhismo estas unu el la grandaj mondaj religioj kune kun la kristanismo kaj la islamo. La japania reĝa familio retroiris la fluon al primitiva pseŭdoreligio.

Ties unikeco estas ke la japanaj dioj estas biologiaj prapatroj de la imperiestroj kio troveblas nenie aliloke en la mondo. Temas pri imaga afero kvazaŭ la anglaj reĝoj insistas ke ili estas prafiloj de Beowulf. Ĝis la kapitulaco de 1945 tio estis instruata en primaraj lernejoj. Neniuj plenkreskuloj, eĉ ne infanoj, kredis tion, sed oni ne povis diri ke la reĝo ne estas vestita, kiel en Anderseno, oni povis unuafoje tion laŭte diri ekde 1945.

Interese estas la ŝanĝiĝo de Hukuzawa Yukiti, la Voltero de Japanujo. Li naskiĝis en familio de malalta tavolo de la kavalira klaso. Jam juna li estis racia, li dubis la diecon de ŝintoismaj temploj en kiujn li enpaŝis, elportis la sanktan statuon de dio; trovinte ke li estis tute ne punita, li forĵetis statuon en necesejon, kio ne alportis punon, tiel ke li fariĝis ateisto. Li tamen poste suferis metamorfozon kaj, jam fidela patrioto, asertis ke la ŝintoismaj temploj devas esti konservataj por la milita gloro de lia patrujo: kompleta utilitismo.

## *4. La tasko de ateistoj japanaj*

Eksa ĉefministro Koizumi preĝis ĉe la ŝintoisma templo Yasukuni. Li konsciis pri balot-voĉoj de la familianoj de falintoj sur batalkampoj. Koizumi pagis el sia poŝo la prezon de la honorario de la templo. Tio estas lia privata ago, kaj li estas libera fari tion, sed en fakto tio havas politikan implicon. La asocio de eksbatalantoj de la militoj havas reakcian politikan konscion kaj grandan rezervon de voĉoj. Ni devas bari tiun reakcion. Kristanoj estas kontraŭ tio ke iliaj filoj estas ŝintoisme adorataj. Ili staras sur la sama flanko kiel la nia.

Reakciuloj diras ke ŝintoismo ne estas religia sekto sed nesekteca, laika asocio: tio estas mensogo. Kiam ili reverencas ŝintoismajn templojn, ĉefrolas en la rito strange antikve vestitaj pastroj. En nia lando, kristanoj estas progresemaj kaj niaj samfrontanoj.

YAMASAKI SEIKO

# Trudo de Religio en la Publikan Vivon

## (kazo de Usono); kelkaj Personaj Impresoj de Miĥaelo Sedgley (Segli), denaska kaj plua laŭpasporta Usonano

La ĉi-suba skribaĵo tute ne pretendas esti io ajn pli ol subjektiva priskribo de travivaĵoj kaj ricevitaj impresoj.

Kompreneble, ĉi tiu temo aplikeblas nur al landoj, kie strikta disdivido de religio disde la publika vivo (t.e. la politika parto de la vivo, regata ĉefe de la leĝaro, inklude ekzemple, la devigan publikan eduksistemon, kaj la uzon de publika mono) estas formale difinita de la leĝaro, inklude la politikan konstitucion se tiu ekzistas. Se la oficiala nomo de Usono estus la Jud-Kristanisma Respubliko de Ameriko, neniu povus logike plendi pri tia «trudo», same kiel tute normalas, ke la Islama Respubliko de Irano estas regata de la Islama pastraro. Alivorte, la problemo de «trudo de religio en la publikan vivon» okazas nur kiam okazas kunpusiĝo inter la reala situacio kaj formala akcepto de la principo de disdivido de religio disde la ŝtato.

Mi ne kredas ne nur je ekzisto de iu ajn «dio» sed ankaŭ je ekzisto de eksterkorpaj «spiritoj» aŭ iu ajn supernatura influo de vivaĵo al aliaj vivaĵoj aŭ nevivaĵoj. Kiam miaj du budhistaj fratinoj sciigis min, ke ili ĉiutage sendas «reiki»-(japane: «spirita energio») ondojn de Usono al mi en Eŭropo por favore influi mian sanon, mi ne povis ne peti ilin ĉesigi tion ĉar ĝi ofendas min. Mia nekredo ne estas bazita sur argumentoj de aliaj. Kvankam mi aŭdis, kiam mi junis, pri aŭtoritata libro de Bertrand Russell kun la titolo, «Kial Mi Ne Estas Kristano» (aŭ io simila), mi neniam legis ĝin, nek iun ajn alian libron, kiu povus influi tion, ĉu mi kredu pri tiaj aferoj aŭ ne. Sed mi devas rekoni, ke unu frazo de brita astronomo en libro pri lia fako, kiun mi legis en la mezlerneja periodo profunde impresis min: (proksimume) «Tiu tre malfacile enkapigebla vastegeco de la universo diras al mi, ke neniu «dio» ekzistas.»

Do la sociaj premoj kredi je «dio» kaj eĉ «spiritoj» neniam havis siajn celitajn efikojn sur min, kaj mi ne povas imagi, ke nur mi aŭ eĉ nur tre malmultaj estas tiaj eĉ en lando de ĉieaj grandaj tiaj premoj, kia estas Usono. De juna aĝo mi sentas (kiel probable ankaŭ tiuj kun «nenormalaj» seksaj orientiĝoj), ke mi apartenas al sufiĉe granda «silenta» tavolo de usona socio kiam temas pri religio. Nuntempe ni estas pli bone protektataj de leĝaj rajtoj ol antaŭe, do ankaŭ ni «aperas de nia kaŝejo», same kiel la samseksamuloj... Laŭ takso, kiun mi lastatempe legis en Interreto rilate al altnivela tribunala batalo por kaj kontraŭ uzo de publika mono por propagandado de religio, la senkaŝaj usonaj ateistoj kaj similaj fakte konsistigas eĉ 15%-on de la loĝantaro. Se aldoni al tiu cifero la sendube grandan tavolon de hipokritaj kredantoj, kiuj elektas la vojon profiti per ŝajnigo, ne devus esti troigo supozi, ke Usono estas nur surface lando de religia ekstremismo. Sed la silenta tavolo ankoraŭ havas preskaŭ neniun influon sur la publikan vivon, kiu estas plu regata de la laŭtvoĉa ekstrema kredantaro, inklude

la hipokritojn, kiu ne konsentas cedi sian regon de la publika vivo kontraŭdire al la principo de disdivido de religio kaj ŝtato, enkorpigita en la Unua Amendo de la Usona Konstitucio. Tiu principo estis formale akceptita nur je la subkomprenita tre malvasta vidpunkto de protekto de religiaj sektoj, de subpremo fare de aliaj religiaj sektoj, neniam en la ĝenerala konscio de la loĝantaro en la senco de rekono de rajto ankaŭ ne kredi! Unu el la plej fortaj esprimoj de abomeno en Usono en la epoko post la Dua Mondmilito estas sendube «sendiaj komunistoj!!!». «Sendia» esprimas abomenon eĉ pli fortan ol la iomete pli objektiva «komunistoj». Usono estas ja lando de politika kaj religia ekstremismo, kiu subpremas individuan liberon de religia kaj politika orientiĝo tra la tuta socia teksaĵo. Mi memoras, ke brita konsulo alparolis nin en la fina ceremonio de gimnazio. Li kuraĝe rimarkigis, ke eĉ tiam (en 1963-a) politika ekstremismo regas en Usono, kiel bone esprimita de la tre populara slogano «Pli bonas esti morta ol ruĝa!» Mi tiam tre dubis, ke multaj el miaj samklasanoj komprenis, kion li diris. Mi, kiu pasigis 10 el miaj ĝis-tiamaj 18 jaroj en Eŭropo, sentis, ke mi ne estas usonano, kiaj ili estas. Post 17 jaroj, kiam mi revenis al Usono de 15-jara restado en Japanio por serĉi laboron, mi denove forte sentis tion. En Japanio estas neniu tabua politika tendenco. La komunistoj estas traktataj ĝentile kiel samdemokratianoj, kiel ankaŭ dekstruloj. Neniu registara instanco kontrolas «kontraŭ-japanajn tendencojn». Ĉiuj tendencoj estas reprezentataj en la parlamento proporcie al siaj fortecoj. En Usono monopole regas du partioj kun minimuma diferenco inter si, ambaŭ sovaĝkapitalismaj. Ankaŭ komunismo ankoraŭ florus en multaj landoj se nur ili estus rekonintaj du inter si konkurencantajn komunismajn partiojn kun nur ekonomia diktatoreco de la proletaro, sen personaj kultoj kaj kun respekto de la elekto de la plimulto en regulaj liberaj kaj lojalaj balotadoj. Mi memoras, ke mi suferis menslavadon en la gimnazio, legante lernolibrojn, kiuj ĉiuj laŭdis nur la usonan «idealan» demokration kaj primokis eŭropajn parlamentojn, kiuj estis nestabilaj kaj neefikaj, precipe tiu de Italio. Mi preskaŭ trovis bonan laborpostenon ĉe la FBI (Federa Buroo de Krimkontrolo) kiel tradukisto de la ĉina, kiu estis mia laborokampo ankaŭ en la armeo dum la Vjetnamia Milito. Mi sukcese trapasis la ekzamenojn pri lingva kompetenteco sed stumblis poste en la intervjua etapo, kiam mi stulte perdis prudenton kaj elbuŝigis, ke mi «ne estas aparte kontraŭ-komunisma». Mi diris tion en la senco, ke mi tre malestimas la siatempajn ekstremistajn kontraŭ-komunistojn en Japanio, Sudkoreio kaj Tajvano. Mi estis persone spertinta ilian fanatikecon dum miaj universitataj jaroj kaj en Japanio kaj en Tajvano. Mi kredis, ke la homoj ĉe la FBI devus esti iom malpli naivaj, sed mi grave eraris kaj tial devis reiri al Japanio pro netrovo de taŭga laboro en Usono...

Sur tiu fono de ekstremismo ne devus esti surprize, ke la «kredantoj» ne hontas ĉiumaniere trudi sian kredon al la ŝtato kaj ĉien en la publika vivo. Ili postulas, ke ĉiuj politikistoj estu kredantoj, ke ĉiuj geknaboj rekonu, ke Usono estas lando «sub Dio», en ĉiu lerneja mateno per

«ĵuro al la flago» kun tiuj specifaj vortoj enŝovitaj en la periodo de la fifama demagogo Senatano McCarthy kaj lasitaj tie eĉ poste, ke reprezentantoj elektitaj en balotado ĉie kaj ĉiam parolu kvazaŭ ili estus jud-kristanismaj pastroj, precipe la plej altnivelaj, inter kiuj la prezidento de la lando devas alparoli la popolon kvazaŭ ĉefpastro de la ŝtato. Mi dubas, ke iu ajn nekredanto sentas sin plenrajta civitano de la ŝtato konstante aŭskultante tiujn «reprezentantojn» pastrumi. La plej naŭziga publika ceremonio por nekredantoj estas tiu, kiu okazas ĉiun kvaran jaron, kiam la nova prezidento faras publikan ĵuron por fariĝi aŭ refariĝi prezidento por kvar jaroj. Tiam profesia pastro estas invitita alparoli al la tuta popolo kaj gvidi ĝin en preĝado! Ĉi-jare estis, tamen, eta koncedo fare de la nova prezidento: li, eble la unuan fojon en la historio de la lando, menciis ankaŭ «nekredantojn» kiel popolanojn de la vidpunkto de religio. Ili eĉ postulas, ankaŭ ke publika mono estu uzata por tre koste ornami ĉiuspecajn publikajn konstruaĵojn per religiaj sloganoj. Sed la plej grava kaj nepardonebla meĥanismo por ŝtata subvenciado de religio estas permeso de 100%-a dekalkulo de imposteblaj enspezoj de mondonacoj al eklezioj! Mi scias persone, ke en Japanio tio ne eblas (mia japana edzino devigis min donaci tri milionojn da enoj al budhisma templo por ke forpasinta pastro ricevu plejaltrangan postmortan titolon kaj nomon!) Mi povus akcepti tian dekalkulon en Usono se ĝi estus limigita nur al mono, kiu estas rekte uzata de ekleziaj organizoj por bonfaraj agadoj ne rekte ligitaj al varbado de kredantoj, sed bedaŭrinde tie estas neniu tia limigo. Tie la ŝtato tiel subvencias konstruadon kaj tenadon de preĝejoj. Grupoj, kiaj la ACLU (Usona Unio por Civilaj Liberoj) kaj la AU (Usonanoj Unuiĝintaj por Realigo de Disdivido de Religio kaj Ŝtato), kuraĝe plu batalas ĉiurimede, sed ĉefe en tribunalaj procesoj, por korekti la hontindan malakordon inter la teorio kaj la praktiko de disdivido de religio kaj ŝtato en Usono, sed konservativaj, partiaj juĝistoj ĉiam blokas la vojon per rifuzo jure konsideri la plene logikajn argumentojn prezentatajn al ili por realigo de vera disdivido de religio kaj ŝtato. Ĉu oni miru pri tio? Tute ne! Ankaŭ ili, enpostenigitaj de politikistoj, sekvas la postulojn de la religiaj fanatikuloj, kiuj neniam pretos rekoni veran disdividon de religio kaj ŝtato kaj respekton por nekredantoj kiel por egaluloj. Dume multaj el ili hipokrite parolas pri «neceso esti toleremaj»; la toleremo, kiun ili porparolas, postulas toleremon de kredantoj inter si kaj fare de nekredantoj, sed bedaŭrinde tute ne toleremon de nekredantoj fare de kredantoj...

*Mikaelo Sedgley (Seli)*

> «Mi estas ateisto. Mi ne kredas je preĝoj, mi kredas je laboro. Kaj mia laboro estas verkado. Mia skribilo estas mia armilo.»
>
> *Taslima Nasrin (verkisto kaj feministo)*

# La CILALP kuniĝis en Londono

Okaze de la ĝenerala asembleo de la Internacia Unio Humanista kaj Laika (IHEU) la 7an kaj 8an de junio 2009 en Londono, la ĉeestantoj kiuj cetere animas la CILALPon (Internacia Ligo-Komitato de Ateistoj kaj LiberPensuloj) kundiskutis pri la necesa refondiĝo de vera Internacio de la Liberpenso.

Partoprenis homoj el: Argentino, Britio, Francio, Germanio, Hindio, Irano, Irlando, Nepalo, Niĝerio, Norvegio kaj Rumanio.

La CILALP proponas al ĉiuj asocioj de ateistoj kaj liberpensuloj, fondi en 2011, en Oslo, okaze de la Kongreso de l'IHEU, Internacian Asocion de La Liberpenso.

Cetere la iniciatintoj substrekas ke tiu projekto necesigos financajn lanĉrimedojn, kaj tial alvokas ateistojn kaj liberpensulojn je mona helpo por ĝia efektivigo.

*anonco el la franclingva revuo*
*La Raison (la Racio).*
*resumis kaj elfrancigis C.Rivière*

p

# Ateismo

## Organo de ATEO

**Legu ĉi tiun bultenon ankaŭ ĉe:**
http://www.gazetotekolanti.com/ateo/ateo09.pdf

**Retskribu al liberpenso@gmail.com**

*GRAVAJ NOTOJ:*

1 Ne subskribitajn artikolojn verkis la redaktoro.

2 Oni **povas reprodukti** artikolojn, kondiĉe ke oni **citu la originon.**

3 Ni ne korespondos pri nepetitaj artikoloj. Tamen, ni klopodos publikigi ĉiun artikolon kies enhavo estas interesa kaj ne mistraktas iun ajn personon.

4 Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem, ne la redakcio.

*Prezidanto:* **Christian Rivière**, el Francio, christian.riviere@laposte.fr.
*Vicprezidanto:* **Dominique Simeone**, el Francio.
*Sekretario:* **Anna Löwenstein**, el Italio.
*Kasisto:* **Dieter Rooke**, el Svislando.
*Estrarano:* **Yamasaki Seiko**, el Japanio.
*Redaktoro:* **Jesuo de las Heras,** el Hispanio.




Kotizo: 15 eŭroj jare.

## Enhavo

Enkonduko ........ 2
Fresko-soneto al Christian S. ........ 3
ATEO dum la UK en Bjalistoko ........ 4
Vojaĝo en la menson de la K-Kreinto .. 6
Eklezio k. Demokratio en Pollando ....... 9
Omaĝi al Francisco Ferrer ........ 12
Ateismo per racia argumentado .......... 13
Ateismo en Japanujo ........ 14
Trudo de religio en publikan vivon ..... 16
La CILALP kuniĝis en Londono ........... 19

Kovrilo: Kovrilo de la libro ***La dek du pruvoj pri la neekzisto de Dio***, de Sebastien Faure, tradukita de Christian Rivière.